

FLANDRA ESPERANTISTO

MONATIA REVUO

ORGANO DE LA FLANDRA

ESPERANTO

MOVADO

N.E.L.E. (Nia Estas La Estonteco)
Flandra Esperantista Grupo

Ejo * Breughel *
Etn. Jaggmainlaan, 37, Brussel (Belg.)

Officieel Orgaan

van den

Vlaamschen
Esperantisten-
Bond



Flandra Esperanto - Instituto

Vereeniging zonder Winstbejag


Magdalenastraat, 29, KORTRIJK

Poŝtĉekonto: F. E. I. 3268.51 — Telefono: 1654

EL LA PREZARO:

La Viro el Francujo — Ivans	29,—	bind
Gösta Berling — S. Lagerlöf	55,—	»
Riĉa kaj sen Mono — Oppenheim	29,—	»
La Ora ŝtuparo — Oppenheim	29,—	»
Si — H. Rider Haggard	29,—	»
Petrolo, vol 1 — U. Sinclair	29,—	»
Petrolo, vol. 2 — U. Sinclair	29,—	»
Luno de Izrael	29,—	»
La Dormanto Vekiĝas	29,—	»
Pallietter — F. Timmermans	28,—	»
La Leono de Flandrujo — H. Conscience	32,—	»
Tra la Labirinto de la Gramatiko	40,—	»
Elektitaj Noveloj — Lode Baekelmans	7,50	broŝ.
La Du Amatinoj — de Musset	7,50	»
La Mono de S-ro Arne — Selma Lagerlöf	12,—	»
Gösta Berling — S. Lagerlöf	45,—	»
La Homaj rasoj de la Mondo	24,—	»
Kudlago, la malgranda eskimo	5,—	»
La Verda Koro — Baghy	16,50	»
Stranga Butiko. — R. Schwartz	10,—	»
Maria kaj la Grupo. (L. M.-Libro)	22,—	»
Konversacia Literaturo (Cseh-metoda)	12,—	»
Fundamenta Krestomatio — Zamenhof	20,—	»
Leerboek voor Esperanto (geill.) — F. Szilagyi	12,—	»
Examenopgaven	10,—	»
Muusses E-Biblioteko (10 volumetoj)	41,—	»
Het Esperanto in 10 lessen — Witterrijck	5,—	»
Zakwoordenboekje (2400 stamwoorden)	2,50	»
Schildlof Zakwoordenboek	25,—	bind
Groot Woordenboek Van Straaten	80,—	bind
Beknopt Woordenboek Van Straaten	40,—	bind
Plena Vortaro de Esperanto	84,—	bind
Flandra Esper. 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a jarkolektoj	15,—	broŝ.
Flandra Esperantisto, 1-a jarkolekto (sen la no 1)	10,—	»
INSIGNOJ: Malgranda verda stelo:	2,—	
Verda stelo, sur blanka fono:	3,—	
Verda stelo, sur blanka fono:	3,—	
Granda verda stelo, kun blanka rando:	4,50	
Flandra kaj Esperanta flagetoj:	5,—	
Krajono kun surpriso «Esperanto»:	1,—	
Leterpapero kaj kovertoj por 20 po	3,—	
Poŝtkartoj: por 10 po	1,—	

Flandra Esperantisto



Oficiala Organo de Flandra Ligo Esperantista
Aperas ĉiumonate

Cefredaktoro:

A. Pittoors
Ten Eeckhovelei, 125
Deurne-Noord
Antwerpen



Administranto:

Adolf De Keyzer
P. vanHumbeekstr., 3
Brussel (West)

Jara abonprezo: 20 frankoj. — **Eksterlando:** 5 belgoj
Kun membreco al F. L. E.: 25 fr.
Eksterlando: 6 belgoj
Poŝtĉeko: 2321.50 de F. L. E. Brussel.

LA MISVOJO

Himno de la pesimistoj

(Dediĉita al la homoj, kiuj ĉiam plendas, sed nenion faras).

Post densa mallumo ekzistas abismo,
Al kiu la lingvo rapidas;
Ni semas malfidon per simpla sofismo,
Kaj certan distalon ni vidas.
Kaj nin ne konvinkos eĉ pruvoj po miloj,
Aŭ klaraj rezonoj, aŭ bonaj konsiloj,
Car ĉiel malhelpi jam de la komenco
Ni celas kun firma intenco.

Nur fuŝa, malbela, sen ia sukceso,
Ni vidas nepropran laboron,
Eĉ guto acida, falante sen ĉeso,
Doloras plej gajan la koron.
La moko, la rido, la indiferento,
Jen estas la iloj, en ĉiu momento,
Per kiuj ni provas, verŝante sarkasmon,
Velkigi la entuziasmon.

Ni plendas kaj plendas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj pasintaj pensante;
Cent horoj perdiĝas, mil horoj perdiĝas,
Ni plendas kaj plendas konstante.
«Laboru kaj fidu!» La homoj nin petas
«Neniam!» en horo ni krie ripetas,
Obstine gruntante — neniu nin dankos,
Sed tamen la plendoj mankos.

(De Fernando Redondo, el Hispana E.-Gazeto).

Esperanto in de Praktijk.

BULGARIJE. — Talrijker en talrijker worden de bladen die het nut van Esperanto beginnen in te zien. Het te Sofia verschijnend dagblad «Zarja» (uitgave: 40 — 60.000 nummers) wijdt iedere week een pagina groot formaat aan Esperanto. Het geeft allerhande inlichtingen over de Esperanto beweging in de wereld, propaganda-artikelen, e.a.

FRANKRIJK. — Op het internationaal Rotary-kongres, dit jaar te Nice gehouden, hield de nieuw gekozen voorzitter, Mr. Duperrey, een deel der openingsrede, benevens in enkele andere talen, ook in het Esperanto. Op het drukke Parijzer station St-Lazaire staan een 5-tal bedienden-Esperantisten ten dienste van het publiek. Ter herkenning dragen zij een ster op den arm. Het inlichtingskantoor in dit station draagt verder de tweetalige vermelding «Renseignements - Informejo».

Het dagblad «Lyon Republicain» te Lyon, komt een wekelijkse Esperanto-rubriek in te voeren, aldus de tientallen andere fransche bladen volgend die reeds een Esperanto-kroniek bezitten.

HONGARIJE. — In het komiteit van het Eucharistisch Kongres, dat volgend jaar gehouden wordt te Budapest en waaraan jaarlijks bij de 200.000 personen deelnemen, werd een officieele Esperanto-afdeeling gevoegd.

POLEN. — Het jubileum-kongres van Esperanto te Warschau werd bijgewoond door nagenoeg 1000 kongressisten uit 30 verschillende landen. Terzeldertijd hield de internationale vereeniging van blinden-organisaties zijn 14de kongres. 106 blinden uit 14 landen namen er deel aan. Deze laatste vereeniging komt een adresboek uit te geven van blinden-esperantisten. Het bevat 1624 namen uit 38 landen.

TCHECO-SLOWAKIJE. — De opera «De Kus» van de beroemde komponist Smetana werd op 7 October II. in Esperanto-vertaling uitgezonden door het radio-station Brno. Het programma werd terzeldertijd uitgezonden door de andere Tchechische stations en ook door de buitenlandsche radio-stations Lyon P. T. T. (Frankrijk), Kaunas en Klaipeda (Littauen). De uitzending was een waar sukses en zal in de toekomst zonder twijfel gevolgd worden door gelijkaardige programmas.

WERELD-NIEUWS. — Volgens een statistiek, gepubliceerd door de «International Auxiliary Language Association» te New-York, werd in de laatste 10 jaren het Esperanto onderwezen in 1142 scholen van 40 landen; 8564 leeraars uit 66 landen beheerschten de hulptaal.

Nieuwe toeristische brochuren in Esperanto verschijnen zoo wat in verschillende landen. In Polen de steden Warschau, Krakau, Wilna, Gdynia, Krynica; Weenen in Oostenrijk; het ministerie van Handel te Praag in Tcheco-Slowakije; de internationale tentoonstelling te Parijs, (Frankrijk) en het kuuroord Kuressaare in Estonië.

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA.

GENERALA KUNVENO en GENT, la 26-an de Septembro 1937.

Estis reprezentitaj la sekcioj: Aalst, Antwerpen, Brugge, Brussel, Deinze, Diksmuide, Gent, Kortrijk, Leuven, Mechelen, Oudenaarde, Wervik, Wetteren kaj la delegito el Ronse.

La prezidanto Rainson, bonvenigis la ĉeestantojn kaj atentigas la delegitojn de la novaj sekcioj, ke dum la kunveno oni libere povas uzi nederlandan aŭ esperantan lingvojn.

La jarraporto, prezentita dum la kongreso, estis pritraktita punkto post punkto kaj el ĝi rezultis sekvantaj rimarkoj:

— Kelkaj sekcioj ne sufiĉe kunvivas kun la Ligo, ili agas kvazaŭ ekster ilia loko nenio ekzistas kaj ilia ne-respondado al demandoj okaze de la organizo de kursoj treege malhelpis glatan laboron.

— La Ligo nun nombras 31 sekciojn malgraŭ sinsekvaj avertoj kelkaj ne troviĝas enordaj rilate F. L. E. La kunveno decidis sendi lastan alvokon al tiuj neglektitaj sekcioj kun averto ke tutlaste ĝis la 15-a de okt. ili povas sin enordigi. Post tiu dato sekcioj ne-enordaj rilate la landa organizaĵo estos eksigitaj.

— S-ano Roose el Brugge demandas ke aperu en F. E. radiorubriko, sed tio estas nur parte efektivebla ĉar nur malmulte da programoj estas konataj sufiĉe frue por ĝustatempa represado. Al la demando ĉu en F. E. ĉiam estas loko disponebla por anoncoj, la administranto jese respondis.

— Diversaj deziroprimoj estas faritaj koncerne la Instituton; el respondo de la sekretario evidentiĝas ke ĝi povos progresi nur proporcie al pligrandiĝantaj monrimedoj kaj kunlaboro. La programo estas vasta kaj la pli malpli rapida realigo dependas ĉefe de la helpo de ĉiuj. La unua parto jam efektiviĝis: en kunlaboro kun nederlanda entrepreno estas eldonita ilustrita lernolibro, cetere aperis propaganda broŝuro «Waarom Esperanto?» kaj baldaŭ eliros nova poŝvortareto kaj propaganda poŝkalendareto.

— La migranta ekspozicio ne disponas pri sufiĉe da materialo, mankas precipe libroj; F. E. I. metos je ĝia dispono la flandrajn verkojn tradukitajn kaj nova kredito estos konsentata al la prizorganto, s-ano DeBoes. La prez. komunikis ke li metos sian propran libro-kolekton je dispono de la M. E.

— La membro-nombro de Flandra Ligo daŭre kreskas; per helpo de ĉiuj ni devas atingi la ciferon 1.000.

— Pri grupaj bibliotekoj: imitinda estas la ekzemplo de la sekcio Arendonk kio atingis starigon de Esperantista-fako en la vilaĝa biblioteko.

— La ligestraro refoje atentigas pri antaŭa decido, aprobita dum la kongreso en Leuven, ke funkciuloj de la Ligo ne povas okupi similan gvidan postenon en alia nacia Esperantista organizaĵo.

Kiel jam anoncote, S-ro De Troeyer el Arendonk akceptis funkcii kiel grupa konsilanto havanta kiel precipan taskon doni konsilojn pri aranĝo de grupvesperoj; la sekcioj ricevos indikojn pri tio.

Por la elekto de la Ligestraro estis disdonataj voĉdoniloj al la sekciaj delegitoj; la voĉdonadon kontrolis S-oj Van As, DeBoes, Brootcoorens. La rezultato estis:

Prezidanto: S-ano Ranson, 14 voĉoj;
Vicprezidanto: S-ano Cortvriendt, 14 voĉoj;
Sekretario: S-ano Debrouwere, 13 voĉoj;
S-ano De Keyzer, 1 voĉo;
Kasisto: S-ano De Keyzer, 13 voĉoj;
S-ano Debrouwere, 1 voĉo.

S-ino De Kesel komunikis la finanĉan raporton de la kongreso en Leuven. La profita saldo sumiĝas je 1.903,10 fr. sumo dividota inter F. L. E. kaj sekcio Leuven. La prez. dankis la organizon kongreskomitaton pro la sukceso de la Lovena kongreso.

La prezidanto komunikas ke la sekcio Brugge oficiale invitis la 9-an kongreson de Flandra Ligo, je Pentekosto 1938. La ĉeestantoj aklame aprobas la elekton de la urbo Brugge.

Pri la statutoj de la Ligo: multaj ne konas ilin, multaj reguloj ŝanĝis. S-ano Cortvriendt kompilas kaj revizias la tuton kaj post pretigo sendos ekzempleron al la sekcioj por ekzameno. La parto koncerne la kongresoj estis provizore akceptata ĝis definitiva aprobo de la statutoj.

La sekcio Antwerpen submetis skribe al la estraro diversajn proponojn, nome:

— Pli ofta okazigo de ligkunvenoj, por ke la kontakto inter la diversaj sekcioj iĝu pli regula.

La prezidanto respondas ke prefere oni unue aranĝu la aferojn bone; ne pli oftaj sed pli regulaj kunvenoj estas dezirinda, el 31 sekcioj nur 13 nun estas reprezentitaj; la estraro nun plenumas la maksimumon da laboro kaj pliampleksiĝo povas iri nur paralele kun trovo de novaj helpantoj; malgraŭ ripetitaj demandoj laborpretaj samideanoj ne multe sin anoncis.

S-ano F. Mortelmans apogas la proponon de la sekcio Antwerpen kaj kritikis la labormanieron dum la ligkunvenoj kiuj devus esti pli longdaŭraj kaj enhavi ankaŭ ekstertagordajn aranĝojn, ekz. paroladojn k. s.

La prezidanto rekomendas tiucele ĝeneraligon de la regionaj kunvenoj kiuj povas konsisti el instrua kaj amuza partoj; la ligkunvenoj restu laborkunsidoj.

— Diversaj sugestoj rilatantaj al Flandra Esperantisto: diverseco en la rubrikoj, modifo al la formato, paĝnombro, kompostado, litertipoj.

La prezidanto respondas ke la estraro jam pripensis la aferon kaj montras desegnaĵojn por nova koverto kaj titoloj de diversaj rubrikoj; pligrandiĝo dependas de la ensendita teksto. S-ano Verheyden deklaras ke la sekcio Antwerpen estas preta liveri kunlaborantojn por la novaj rubrikoj.

— Aliĝo de la Ligo al ĝenerala kultura asocio: oficiala demando estos farata al «Verbond van Vlaamsche Cultuurverenigingen».

— Organizo de libro-loterio okaze de la Zamenhof-tago kaj eldono de fotoj de la famaj esperantistoj. La sekretario de la Instituto ekzamenos la proponon pri loterio; eldono de fotoj momente



*Ĉu, vi ne forgesis,
Ŝion, pri promesoj?
Ĉu, vi avertis, kaligrafas,
Vin, donac, agrabla, trafas.
Ĉu, ne, skribu, por, porrado;
Ni, konsilas, rapidlegi:
Ĝnari, tempon, je, l' skribado,
Do, da, tempo, restas, legi.*

PLI OL MIL
ilustritajn libropagojn
egalas tutjara kolekto
de nia sola literatura
gazeto:

LITERATURA
MONDO

Abono por jaro: 65 fr.
Specimeno: 2 fr.
La plej detalajn kaj
objektivajn librokriti-
kojn vi trovas en

LINGVO-LIBRO
kvaronjara aldono al
Lit. Mondo.

Abonojn akceptas kaj
specimenojn sendas:

*Flandra Esperanto
Instituto*
Magdalenastr. 29,
Kortrijk
(P. K. 326851).

ŝajnas malfacile realigebla.

— En la kongresregularo estos aldonita ke la organizaj komitatoj klopodu ĉe la urbestroj por atingi inaŭguron de Esperantostrato aŭ placo dum la kongresaj solenaĵoj.

Laŭ propono de S-ano Broodcoorens, la sekretario de la Instituto rilatos kun la organizantoj de «Hoogdagen van de Vlaamsche Letteren» por ekspozicii la esperantajn tradukojn de Flandraj verkoj.

Diversaj komunikoj ankoraŭ estis farataj de la estraro, nome:
— ke la regionaj kunvenoj ne plu okazu je dato proksima de ligkunveno;

— ke oni avertu la ligestaron pri la dato de specialaj aranĝoj, por eviti ekzemple ke samdate okazu regiona festo en Antwerpen kaj grava ekspozicio en Leuven;

— pri la oktobra numero de F. E. kiu estos la centa, fakto malofta en Esperantujo: seninterrompa aperado dum 100 monatoj!

— pri projekto de gazetservo;

— pri la ekzemplo de kelkaj sekcioj kiuj starigis vendo-servon je intenco de siaj membroj.

La venonta kunveno okazos en Gent, la 9-an de Januaro 1938.

La liga sekretario.

Komunikoj de la Ligeŝtraro

ONZE BONDSVERGADERING TE GENT

werd door 13 afdeulingsafgevaardigden bijgewoond, terwijl F. L. E. 31 afdeelingen telt! Beseffen de afdeelingen, welke op onze bondsvergaderingen door hun afwezigheid steeds uitblinken, dat hierdoor het noodige kontakt tusschen bond en afdeeling en tusschen de afdeelingen onderling, wordt geschaad?

UIT F. L. E. GESLOTEN

Wegens het niet nakomen harer finantieele verplichtingen werd afdeeling Zaventem uit F. L. E. gesloten.

TENTOONSTELLINGSMATERIAAL

Voor het in bruikleen ontvangen van tentoonstellingsmateriaal wenden de afdeelingen zich tot *Migranta Ekspozicio F. L. E.*: Sano G. De Boes, Wijnstraat 81, Ronse.

ONZE PROPAGANDA-BROCHURE EEN SUCCES!

Op 15 October j.l. waren reeds 2.250 ex. «Waarom Esperanto?» verkocht! Een uitstekend middel voor de propaganda op proeflessen en werfavonden! Welke afdeeling is niet in bezit van een voorraad «Waarom Esperanto»? Dadelijk bestellen bij F. E. I. Prijs: 1 fr., 20 % korting aan onze afdeelingen en vertegenwoordigers bij bestelling van minstens 10 ex.

EEN UITSTEKEND LEERMIDDEL

is «Leerboek voor Esperanto» van Dr. F. Szilagyí met 200 illustraties, woordenlijst en controleblad voor hen die zonder onderwijzer zichzelf Esperanto willen leeren. Te bestellen bij F. E. I. Prijs: 12 fr., 30 % korting aan onze afdeelingen en vertegenwoordigers bij bestelling van minstens 20 ex. en 20 % voor minstens 10 ex.

STATISTIEKEN F. L. E. en F. E.

Op 15 October j.l. telde F. L. E. 662 leden, F. E. 480 abonneerten. Verheugend en toch ontstemmend wegens de opvallende wanverhouding tusschen het aantal leden en abonneerten! Ieder lid ook abonneert op F. E. weze het parool in onze afdeelingen!

VOLGEND «FLANDRA ESPERANTISTO»

verschijnt op 1 December. Kopij moet uiterlijk op 15 November in het bezit zijn van de redactie (Ten Eeckhovelei 125, Deurne N. Antwerpen).

KURSA CENTRO F. L. E.

De afdeelingen of vertegenwoordigers van F. L. E. welke een Ĉe-cursus wenschen voor begin Februari (tweede reeks) verwtigten *onverwijld* de Kursa Centro van F. L. E. steenweg op Hombeek 54, Mechelen. Een eerste reeks cursussen is nu begonnen. De vijf Ĉe-onderwijzers van de Kursa Centro geven les in ongeveer 35 plaatsen.

VERDA STELO EFIKAS

Vojaĝi per Verda Stelo estas mirinda!

Tion ja mi plurfoje spertis dum miaj migradoj en Svisujo, Aŭstrujo, Italujo, k.t.p. kaj precipe dum mia lasta vojaĝo, ĉi tiun someron, al Norvegujo kaj Svedujo, kio instigis min ĉi-tie laŭdi Esperanton, nian karan lingvon, tiom kiom mi povas.

Jen, jam de mia ekforvojaĝo ŝipe, de Antwerpen al Oslo, ni ne ankoraŭ estis elveturinta la Skeldon, kiam mi ekrimarkis inter la kunveturantoj, sinjoron kiu portis sur sia brusto «Verdan Stelon». Nature, per «Bonan tagon, Sinjoro», mi tuj konatiĝis kun li. Estis sinjoro el Oslo, tre afabla, simpatia kaj sperta Esperantisto, kiu klarigis al mi multajn, interesajn aferojn pri la nordaj landoj, iliaj popoloj, industrioj, k.t.p. kiu donis al mi utilajn konsilojn, kiuj savis min poste de seriozaj malagrablaĵoj. Vera samideano. Kiam ni, post du tagoj, alvenis en Oslo, estis kun bedaŭro ke mi devis adiaŭi lin.

De ĉi-tie mi komencis tri semajnan migradon, preskaŭ tra la tuta, belega Norvegujo kaj Svedujo, farante pli ol du mil Km. bicikle kaj tiom vagonare sen ke mi renkontis ian malfacilaĵon danke al Esperanto, ĉar ĉie mi renkontis bonkorajn gesamideanojn kiuj estis pretaj por doni helpon, klarigojn kaj konsilojn; danke al Esperanto mi faris belegan, agrablan, amuzan vojaĝon dum kiu mi multe lernis kaj spertis. Ĉion tion danke al Esperanto kaj arego da samideanoj. Multajn el ili mi jam dankis skribe sed kelkajn el ili mi volas tamen tie-ĉi ankoraŭ foje danki aparte, kiel la Sroj Egil Alstad kaj Leif Sylow el Trondheim, Sro. Gustaf Fors el Gnarp ĉe Sundvall, Fino Siri Linnander, Ges. Ragnar kaj Ester Erikson el Stockholm, kaj Sano. Sigfrid Ohlsson el Arvika. Al ĉiuj mian plej koran dankon ĉar ili ebligis al mi fari ion, kion mi neniam forgesos.

Ne, nur Esperantistoj povas tiom ĝui de vojaĝo. Mi ne povas min imagi ke ne-esperantisto farus tian kiel vera turistoj ĝin ŝatus fari, almenaŭ kiam li ne scipovas la lingvon de la lando en kiu li vojaĝas. Ĉu li renkontus ĉie tiajn intimajn kaj servemajn amikojn kiel ni Esperantistoj? Ĉu li enirus privatajn domojn kiel ni Esperantistoj ĝin povas, kion ni nepre devas fari kiam ni volas pristudi la morojn kaj kutimojn de la popoloj kiujn ni vizitas? Ne, oni lin nur ŝatus en multekostaj hoteloj. Ĉu li venus en tian kontakton kun la popolo kiel ni? Estas privilegioj rezervataj al la portantoj de la «Verda Stelo».

Tial instigu ni la vojaĝemulojn por lerni Esperanton, kaj al vi Esperantistoj, mi konsilas, kiam vi migradas, uzu nian lingvon, portu la «Verdan Stelon», flirtigu Esperantan flageton sur via biciklo kaj vi memiros pri la sorĉa povo de nia kara steleto, kiu estas la vera, la nura ŝlosilo por la migremuloj, per kiu oni ĉion malfermas kaj per kiu oni ĉien iras.

N. E.
Pionirano.

Wereldjamboree en Talenverwarring

Veel is er geschreven over het 5-de scoutskamp, of liever over het uiterlijk vertoon er van, want het aantal defilees, opmarschen, rally's en andere «show»-nummers hebben het doel van de jamboree wel eenigszins in de schaduw gesteld.

Alhoewel hij de jamboree-demonstraties in de bladen heeft gevolgd, zal menig lezer vreemd opkijken wanneer wij gewagen over het *doel* van jamboree's. Ja, wat is eigenlijk het doel van dergelijke kampen, waar om de drie jaar tienduizenden scouts uit tientallen landen bij elkaar komen? Volgens Robert Baden Powell, stichter der padvinderebeweging, is dit: vrienden maken.

Om dergelijk doel te bereiken is o.i. méér noodig dan het in acht nemen van de scoutsbeginsels en het dragen van de scoutskleedij, tenminste als zulk ordewoord geldt voor internationale bijeenkomsten. Vrienden maken, als daar tolken en vertalingen bij te pas moeten komen, is zelfs voor scouts quasi-onmogelijk.

Een klein leger tolken en veeltalige opschriften hebben op de jamboree aan de talenverwarring weinig verholpen. De 30.000 deelnemers uit 40 landen, in kampen en subkampen ondergebracht, hebben het doorgaans met de primitieve gebarentaal moeten stellen, als ze soms onderling in betrekking kwamen. In de Nederlandsche, en ook in de buitenlandsche pers, verscheen menig bericht over de taalmoeilijkheden welke zich ieder oogenblik voordeden. Dat de scouts dan maar liever omgang met taalgenooten zochten, of in hun kampen bleven samenhooken, spreekt van zelf, en dat van het «vrienden maken» weinig in huis kwam hoeft ook geen betoog.

Dat de scoutsleiding in dergelijke toestanden berust en alles zóó best vindt, is haar goed recht, maar dat ze het diegenen die hierin willen verhelpen onmogelijk tracht te maken, getuigt van verregaande kortzichtigheid. Hoe anders het optreden der Nederlandsche scoutsleiding betitelen, die alle Esperanto-propaganda niet alleen in het kamp maar ook in een omtrek van 5 Km. heeft laten verbieden en een bijeenkomst van S. E. L. (Skolta Esperanto-Ligo) wist te dwarsboomen.

Toch lieten de scouts-esperantisten zich niet onbetuigd, alhoewel van de 300 er slechts 25 in een te korte bijeenkomst konden vergaderen. Deze 25 scouts vertegenwoordigden 5 nationaliteiten, voor hen bestonden geen taalbelemmeringen, slechts Esperanto weerklonk op hun kleine vergadering. Onopgemerkt, verloren tusschen de duizendkoppige massa was ze niettemin een veelbetekenend contrast met de machtige jamboree-babel.

Opvallend was, dat het beheer van posterijen meer voorkomendheid ten overstaan van Esperanto aan den dag legde dan sommige scoutsleiders lief was. Door toedoen van ing. M. H. Damme, directeur-generaal der Nederlandsche P. T. T., werden slechts postbedienden die Esperanto machtig waren op het jamboree-terrein in dienst gesteld. In de bank werden de vreemdelingen het eerst

in Esperanto aangesproken. Ook bij den kapper kon men met Esperanto terecht en Esperanto-literatuur was insgelijks verkrijgbaar.

Na herhaald aandringen van de Nederlandsche scouts-esperantisten, heeft de jamboree-leiding haar houding in deze op het laatste oogenblik eenigszins gewijzigd, dit moge blijken uit het aanstellen van officieele Esperanto-tolken en het in dienst stellen van een Esperantist op het inlichtingskantoor.

Uit het voorgaande blijkt dat er voor S. E. L. nog een zware maar heerlijke taak is weggelegd. Van harte wenschen wij haar dan ook goed heil!

E. C.

Ĉu la akuzativo ekzistas en Esperanto?

Jen stranga demando! Ĉiuj aŭ preskaŭ ĉiuj lernolibroj de Esperanto ja mencias la nomon!

Guste pro tio, kara leganto, ni esploru la aferon ĉi-tie. La kialoj? Ĉar

1. — Oni trouzas —
2. — Oni ne komprenas —
3. — Oni misuzas —
4. — Oni tute ne bezonas la vorton «akuzativo».

Vi ĉiuj jam mem konstatis ke en multaj, precipe holandaj, lernolibroj oni uzas la gramatikan terminologion de la naciaj lingvoj. Oni parolas ne nur pri la nominativo kaj la akuzativo, sed eĉ pri unua kaj kvara kazo,..... kie ekzistas nek dua nek tria!

Profunda eraro! Bone komprenu min: estas eraro el metodologia, el instrua, el pedagogia vidpunkto. Nur analogie kun aliaj lingvoj ni povas sekvi aŭ kompreni vin, kiam vi uzas la vorton «akuzativo».

Efektive, parolante pri «akuzativo» oni sugestas al la lernantoj ion malfacilan. Por eviti erarojn oni neniam devas atentigi pri malfacilaĵoj. Kontraŭe, oni devas serĉi sistemon de instruado, kiu prezentas la gramatikan materialon laŭ multe pli facila, pli lernebla kaj..... pli ĝusta maniero. Tia prezentado estas dezirinda kaj..... ebla por la temo kiu nin okupigas.

- I. — Oni havas «frazon» kiam oni mencias subjekton kaj predikaton (verbon) Ekz. Mi manĝas. Laboras ili. Silentu!
- II. — Kiam la frazo pligrandiĝas per aldono de objekto, la frazo *ne restas klara*. Ekz. La patrino amas mi. Ĉu vi komprenas min? Ne. Pro tio mi donas *signon* al la nova elemento kiu enpenetris la frazon. Tiu signo utilas por *klarigi* la frazon. Tiu signo estas «*n*». Ni nomu ĝin, logike kiel ĉie kaj ĉiam en Esperanto, *klariga n*.
- III. — Ĉiuj novaj aldonaĵoj, ĉiuj restaj elementoj en frazo estas komplementoj. Ilia karaktero, ilia signo estas la prepozicio, kiu havas pro tio en Esperanto tre precizan kaj bone difinitan signifon. La komplemento rilatas do en frazo nur pere de la prepozicio. Sed homa lingvo — ankaŭ Esperanto — vivas, kaj oni na-

ture mallongigas la frazojn. Oni ofte forlasas la prepozicion, nome, kie la forlaso ne malhelpas kaj ne estas danĝero por miskompreno. En Esperanto oni ĉiam rajtas forlasi la prepozicion. Sed la justema spirito diras:

1. Se mi forlasas ion, mi devas rekompenci tion, aŭ
2. Se mi forlasas ion, mi malhelpas al la signifo, kiu fariĝas malklara. Mi uzos la saman averto-signon; mi ree devas klarigi la frazon pere de *la sama klariga n*.

La resto estas terure facila: Oni neniam forlasu la prepozicion, metante *n*, kiam ĉi-tiu litero ne estas *klariga*. Ekz. Mi iras straton (ĉu «en», ĉu «laŭ», ĉu «el»? , k. t. p.) = la frazo ne taŭgas ĉar la *n* ne estas *klariga*.

IV. — La nura regulo estas deposed nun: la *n* ekzistas en Esperanto por averti kaj por klarigi kio ne estas klara. Tio estas la nura klarigo por la *n* de direkto. Ekz. Ho! jen birdo kiu flugas en la ĉambro. Mia aŭskultano eble ne komprenis min. Kaj por averti lin ke la birdo ne jam estis en la ĉambro k.t.p., por indiki la celon de la direkto, unuvorte, por klarigi la frazon, mi denove uzas la *saman klarigan n*. Kial mi ne uzas ĝin en «iri ĝis la pordo» «vojaĝi al Parizo»? Pro la fakto ke ĉio *jam estas* klara — dubo ne estas ebla. Kial «vojaĝi Parizon»? *Klariga n* pro la malklariga forfalo de «al»!

Plie, la *n* ne ĉie estas «akuzativa»! «Mi donas mian patron»: dativo? «Tiun-ĉi someron la vetero ne taŭgas»: ablativo?

KONKLUDOJ: Ni spertis do, ke *la N ĉiam nur estis klariga, sed ne ĉie akuzativa*. Mi proponas do pro kaj por la bono de la lernantoj paroli pli bone, pli ĝuste kaj pli klare pri..... *klariga n* (verduidelijkings-*n*) kaj ne pri akuzativo. Estus nur unu argumento: *Zamenhof mem uzas la vorton*. Sed: Zamenhof uzis nur la *vorton* kaj celis la saman kiel mi per «klariga *n*». Sed Zamenhof uzis la *vorton* por diri ĉion unuvorte; li donis nomon nur al la fenomeno, kiun li tiel multe renkontis en aliaj lingvoj. Por li, kiu sentis sin mem intima kun kaj kutima al la gramatiko, la vorto akuzativo *sufiĉis*. Zamenhof pensis lingve kaj gramatike, sed mem ne jam sentis nek bezonis la instruan aŭ pedagogian flankon. Mi do tute ne perfidas nian Majstron. Mi nur konstatis ke ĝis nun oni nur diskutis pri la *vorto* akuzativo, kiu estas en Esperanto tute *malplena* kaj kiu *nenion signifas*. Por mi nur taŭgas unu regulo: sekvi Zamenhof *laŭregule* sed ne *laŭlitere*. Tio estas ja elemento de la *interna ideo* kiu donas al Esperanto la vivon poreterne.

CALCIVIRO.

DIVERSAĴOJ

ESPERANTO WERELDHULPTAAL?

Onder dezen titel vonden wij in «Laborista Esperantisto» interessante bedenkingen waarvan we de voornaamste graag onze lezers ter overweging geven. Hier gaan ze: «Hoewel minder dan voorheen, hoort en leest men tegenwoordig nog hier en daar van

«Esperanto de *wereldhulptaal*». De voorstelling, die het woord *wereldhulptaal* bij den leek wekt, is: een taal waarmee men zich in geval van nood behelpen kan, een soort surrogaat van «echte» taal, maar die deze niet in alle opzichten vervangen kan en weinig meer kan beteekenen dan gebarentaal. Dat deze onjuiste voorstelling, door dit woord veroorzaakt, de propaganda niet vergemakkelijkt, is duidelijk. Wij begrijpen niet, hoe men de voorkeur kan geven aan het lastiger woord *wereldhulptaal* boven het logischer *internationale taal*. Het is immers onze bedoeling dat, terwijl de nationale talen voor binnenlandsch gebruik bestemd blijven, het Esperanto als internationale dienst zal doen. Ook het woord *wereldtaal* wekt misverstand. Men vestigt met dit woord den indruk dat Esperanto de nationale talen wil verdringen, teneinde alleenheerscher te zijn, hetgeen nimmer Zamenhof's oogmerk is geweest. Laat ons daarom termen, die verwarring stichten, vervangen door 'n betere en in 't vervolg spreken van *internationale taal* Esperanto.

OPINIO PRI LA VARŠAVA KONGRESO.

En «Interligilo», aperanta en Roterdamo, ni legis ke radiostacio Salamanca (Hispana stacio en posedo de la ribelanta generalo Franco) disradiis sekvantan komunikon okaze de la sendo de saluttelegramo flanke de la Kataluna registaro al la internacia E-kongreso en Varŝavo: «La bolŝevika kongreso de la juda lingvo Esperanto en Varŝavo, voĉlegis iun bolŝevikan telegramon de la ruĝa registaro de Katalonujo. La ĉeestantaj bolŝevikoj kaj judoj laŭte aplaŭdis tiun bolŝevikaĵon». Komentario superfluas!

KURSGVIDANTOJ atentu! Ni helpas al vi dum la kurso kaj sendos donacon por viaj lernantoj. Skribu al K. Kalocsay, Hungarujo, Budapest VIII. Mária-u 34.

Ljubljana denove dissendos belegan Esp. Radioprogramon!

La 4-an de novembro 1937, vespere je la 21.15 - 22.15 okazos tute esperantlingva dissendo pere de radiostacio LJUBLJANA — 569,3 m. — sub la nomo

«VESPERO DE SIMON GREGORĈIĈ»

Simon Gregorĉiĉ estas unu el la plej eminentaj slovenaj poetoj. Detalaĵoj el lia vivo kaj pri liaj verkoj vi ekscios el la parolado de s-ano Kozlevĉar Joze dum la dissendo.

JEN LA PROGRAMO :

1. — «Stelo nia». Kanto, kantata de anoj de Esperanta klubo.
2. — Simon Gregorĉiĉ. Parolos s-ano Kozlevĉar Joze.
3. — «Rebrilo de senkulpa okulo». Kanto kaj solkantoj.
4. — «Vivo ne estas festo». Florparolado prezentata de geanoj de Esperanta klubo.
5. — «Al monta paradiz'?» Kanto kun solkantoj.
6. — «Nur homon ne». Recitos Lukas Leo ano de Esp. klubo.
7. — «Siritaj floroj». Kanto.
8. — «Al patrujo». Recitos s-anino Cukale Ela.
9. — «Ne venas li». Amkanto kun solkantoj.

Antaŭ ĉiu programpunkto — kanto kaj deklamo — okazos mallonga priskribo de la enhavo, kiun donos s-ano Mizerit Deziderij.

La tutan programon preparis, prezentos kaj kantos geanoj de Esperanta klubo, Ljubljana, kaj ĝi estos akompanota kun muziko.

Tio signifas- ke vi havos okazon aŭdi belegan Esperantan programon!

GESAMIDEANOJ! Aŭskultu Ljubljanan! Instigu la esperantistoj kaj konatulojn al aŭskultado!!! Ĉiuj esperantistaj organizoj, aŭskultu kolektive!!!

Skribu *nepre dankesprimojn* al la adreso: RADIO STACIO, LJUBLJANA, JUGOSLAVIO.

Bibliografio

En la serio «Muusses Esperanta Biblioteko» eliris nun la 10-anoncitaj numeroj. La eldonejo komunikas ke la dua serio komencos aperi ek de septembro.

Jen broŝuroj je modera prezo, kun enhavo varia kaj intereso-plena, en facila flua lingvo, kiu devus troviĝi en ĉiu grupa biblioteko kaj en la ŝranko de la samideanoj kiuj volas scii ion pri lingvaj aferoj, pri la unua periodo de la movado kaj legi fremdan literaturon.

Pro kaŭzo neklarigebla, estas malfacile vendi Esperantajn librojn en nia lando; ŝajne por ĉi tiuj malmultekostaj broŝuroj oni ne faris escepton, konsiderante la malgrandan nombron da mendoj faritaj pere de F. E.

La serio da 10 broŝuroj kostas afrankite 41 fr.; unuopaj ekzempleroj 5.80 fr.

LA NAIVECO DE PASTRO BROWN, de G. K. Chesterton; esperantigis D-ro Cecil Bean; eldonita de The Esperanto Publishing Co; 256 paĝoj, bindita, prezo 29 fr.

Ĉi tiu libro estas la numero 14 de la populara Esperanto-biblioteko, kiu pliriĉigas nian literaturon per verko kiu certe ĝojigos la amatorojn de detektivaj romanoj.

Dekduo da historietoj, sendependaj unu de la alia, rakontas pri la mirinda ruzeco de pastro Brown, kies naiveco estas nur laŭŝajna. Oni povas konatiĝi kun tuta serio da krimoj, iranta ĝis kapoj tranĉitaj, laŭ la maniero de la konata «Grand Guignol».

Estas tipe angla romano, al kiu la tradukinto certe volis konservi la originalan karakteron, kio kelkloke kondukis al fraztur-niĝoj ne tuj kompreneblaj. Sur paĝo 76, ni legas pri persono dirante: «mi ne estas certa, ke mi komprenas»; estas sendube ke la legantoj kiuj ne tre bone estras la lingvon ofte faros al si la saman rimarkon.

Kiel ĉiuj libroj el tiu serio, la presado kaj bindado estas bone prizorgataj kaj la malalta prezo faras ĝin dezirinda libro.

ELEMENTOJ LATINAJ EN ESPERANTO, de Franjo Modrijan, Eldonis Esperanta Klubo, Ljubljana, 46 paĝoj, broŝurita. Prezo: 6,50 fr.

KOMUNA KANTLIBRO, redaktita de H. W. kaj N. Holmes, kaj eldonita de The Esperanto Publishing Co., Ltd. Anglujo. Prezo: 7,50 frankoj.

Jen, je prezo modera, la ideala kantbroŝuro por grupkunvenoj, ekskursoj kaj aliaj gajaj okazoj! Ĝi enhavas 36 diversajn kantojn kun la akompana muziko, tiel ke ili estas ĉiuj facile lerneblaj se la klubo disponas pri muzikkonanta membro.

Jen kelkaj titoloj kiuj jam reflektas la karakteron de la enhavo: Sub Signo de la Nova Lun', Estas Tru' en Sitelo, Kongresanino, Mario havis Ŝafon, Insulo Kapri, Klementin', k.t.p. Estas sen dubo ke la Flandroj, kiuj formas kanteman popolon, faros bonan akcepton al la nova kantaro.

VETERANO? verkis Ismael Gomes Braga; eldonis «Gazeto de Ameriko», Rio-de-Janeiro. Prezo broŝ. 1,50 sv. fr., tole bind. 2,50 sv. fr.

Demandaro dissendita okaze de «Festo de la Veteranoj», aranĝita de la jubilea kongreso de Esperanto, sugestis al la aŭtoro respondojn ampleksantajn pli ol 100-paĝa libro. Estas legaĵo interesa, tra kiu oni sentas la persistan entuziasmon de pioniro laboranta en regiono kie la propagando postulas multe pli da oferoj ol en aliaj landoj. Parto de la libro konsistas el serio da artikoloj jam represitaj en la Gazeto de Ameriko, kiuj atestas pri la klara juĝo de la aŭtoro koncerne mondlingvajn problemojn.

Tiu libro, la unua originale verkita kaj presita en Brazilo, estas valora akiraĵo kaj leginda speciale por samideanoj sin okupantaj pri propagando.

ESSENCIA E FUTURO DA IDEIA DE LINGUA INTERNACIONAL. — L. L. Zamenhof; tradukis: Ismael Gomez Braga; eldonis: Lingua Auxiliar, Rio-de-Janeiro. Traduko en Portugala lingvo de la traktaĵo «Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia», kiu aperis en la jaro 1900, sub la nomo «Unuel», pseŭdonimo de Dro Zamenhof.

LA VERDA KORO. — Julio Baghy. Facila romaneto el la vivo de esperantistoj en Siberio, por komencantoj, por daŭrigaj kursoj. Eldonis: la nederlandaj geamikoj de la aŭtoro. Prezo: 16,50 fr. Verki romaneton por komencantoj, konservi facilan fluan stilon, ne donante la impreson ke temas pri ekzerclibro kaj tamen konservi streĉitan intereson ĝis la lasta linio, jen tasko kiun Baghy majstre efektiviĝis. Estas bonega libro por post-kursaj lecionoj, enhavanta je la fino multajn gramatikajn resumojn kaj vortaran materialon. Aro da desegnaĵoj ornamas la tekston; estas aldonita grupa himno «Nova Sento», teksto de Baghy kaj muziko de Pallos.

Nur domaĝe estas ke la vendoprezo ne estas pli modera, por permesi grandskalan uzon.

Por nia Liga Flago

Sekcio Gent (Roeland) 25 fr.
Sekcio Wervik (Fратиго) 13 fr.

GRUPA VIVO

AARSCHOT — LA PROGRESO.

Ĉiun jaron niaj vintraj kursoj komencas la unuan vendredon de Oktobro. Dum la somersezo ni seninterrompe kunvenis ĉiun semajnon. Krom tio ni preskaŭ ĉiun dimanĉon multope ekskursis. Ĉie, kie ni havis la okazon, ni energie propagandis por Esperanto buŝe kaj skribe. Je la komenco de nia unua leciono, ni ne povis kredi niajn okulojn. Pli ol plenplena estis nia ejo. Mankis benkoj kaj seĝoj kaj ni devis preni ilin el la trinkejo. Tridek personoj, kiuj neniam aŭdis pri Esperanto ĉeestis kaj atente aŭskultis la enkondukan paroladon de la prezidanto. Li pritraktis la altan celon de nia Majstro kaj la grandan utilecon kiun donas Esperanto al ĝiaj praktikuloj. Li klare pruvis ke Esperanto vere estas internacia kaj ke ĝi apartenas al la tuta homaro. Poste li prezentis al la ĉeestantoj Finon Mathilda Peeters kiel instruistino. Ŝi gvidos dum tuta vintra la novbakitajn Esperantistojn en la unuaj paŝoj en nia kara lingvo.

Post la leciono ni enskribis 26 novulojn kaj nia grupo havas nun 45 geanojn. Ni speciale gratulas la amikojn el Rillaar kiuj alportis multajn novajn membrojn.

Antaŭen, geamikoj, Antaŭen! Baldaŭ «La Progreso» estos la plej forta grupo en Flandrujo.

ANTVERPENO — FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA.

Nova sezono, novaj problemoj! La verecon de tiu frazo niaj anoj sentis precipe al la ŝanĝita klimato de la kunsidoj. Tiun ĉi monaton oni ĉefe pritraktis la kursojn kaj la internan organizon, Tiurilate «Libro-Servo» estis aranĝita: de nun la anoj povas mendi librojn kaj gazetabonojn pere de la grupa kaso: ili devas kompreneble repagi sed nur ĉiusemajne kaj procente; tiu sistemo permesos al ĉiuj plenigi bibliotek-ŝrankon sen elspezi tro da mono unufoje. Laŭ alia vidpunkto, oni zorgis ankoraŭ pri amuzaj distraĵoj: ludversperoj okazos ĉiun sabaton (la merkredaj tagordoj estas ja tro ŝarĝitaj!) dum kiuj kartoĵ, ŝakludoj, rusa bilardo, tabla teniso k. t. p. estos je la dispo de la ĉeestantoj. La piedpilkuladantoj ankaŭ ne povos plendi: baldaŭ ili havos terenon kie ili povos ĉiun dimanĉmatenon kvietigi sian pasion (!).

Vizito al Nordfranca grupo, laŭ propono le S-ro Pittoors, estas praktike ekzamenota. Kaj nova jaro aperas jam je la horizonto: sufiĉe da laboro estas do en provizo... Kaj la tempo progresas senlace; niaj zelo kaj agado devas sekvi la saman ritmon... Antaŭen!

BRUSSEL. — N. E. L. E.

S-ano F. W. Buenting, Ĉe-instruisto el Ned. Hindujo, faris grandskalan propagandon en nia urbo. En «Paleis voor schoone Kunsten» li okazigis provlecionon kiun ĉeestis plus minus 350 personoj.

Nia sekcio intense propagandis por nia rektmetoda kurso kiu okazos en la festsalono de nia ejo. Propagandcele ni uzis 800 ekzemplerojn de la broŝureto «Waarom Esperanto?»! Venontan monaton ni povas raportti pri la rezulto de nia agado kiun ni esperas proporcia al niaj klopodoj.

KORTRIJK. — La propagando farita per aranĝo de stando en la komerca foiro, bone influis la grupan vivon kiu akiris novan vigecon; estas okaze de tiaj manifestacioj ke oni povas mezuri la laboremon de la membroj.

La evento de la lasta monato estis la vizito de S-ano Moy Thomas el Londono, kiu ĉarmis nin per sia neelĉerpebla kantkolleto; sukcesa estis lia improvizado, laŭ la konata ario Konstantinopolo, rememoranta pri vizito al Antverpeno dum kiu la sekretario de certa grupo ne venis al fiksita rendevuo.

La estraro elektis la 12-an de decembro kiel daton por la 10-jara jubilea festo de la grupo; sur la programo estas: festeno, teatraĵo kaj balo.



Esperanto en Komerco kaj Turismo. Stando en komerca foiro en KORTRIJK

Vivi estas ŝipveturi
de l' naskiĝo ĝis la morto,
en la granda mar' de l' zorgoj,
sur ŝipeto de la sorto!

Juul Karnas.

ANGULO DE LA SERĈEMULO

SOLVO DE PROBLEMO 31.

Horizontale. — Akapar, rabato, dato, erar, en, radikal, fa, kuz, kalio, kat, urin, des, maro, rabio, dezir, egal, lice, solen, remet, ador, par, navo, foj, valor, tir, ir, vagonar, ta, ligo, idol, ofi-cir, kisado.

Vertikale. — Asekur, safiro, nura, odor, ad, zibeloj, li, par, niger, vic, atak, oan, vagi, rodad, pagur, ileo, valo, rekis, konik, arao, dir, radi, bal, mecen, ros, ar, kazemat, la, fari, evit, orator, torako.

SOLVO DE PROBLEMO 32.

Pionir. La Progres. Norda Stel. Roeland. La Estont.
Flandra Ligo Esperantisto.

SOLVO DE PROBLEMO 33.

La policano devas ĉirkaŭkuri (2) du foje la lageton.

SOLVO DE PROBLEMO 34.

Oni devas plenigi la barelon per truoj.

Jarbatalo. 1a) K. Pollet (359 p.). 2a) Fino. V. D. Mast (355 p.)

Premioj: por problemo 31: Sro. *Th. Van Gindertaelen.*

por problemo 32: Sro. *Th. Van Gindertaelen.*

por problemo 33: Fino *L. Keveryn.*


por problemo 34: Sro. *A. De Grootte.*

Prezeraro. En problemo 36 (divido) mankas al la unua produkto *Punkton* post RFF. En probl. 35 *Vert.* 6) mankas la 4-a vorto: certa.

Novaj Problemoj

PROBLEMO 38 KRUCVORTO.

Por ĉiu problemo ni forlotumas unu premion. La 8/10-ojn de la poentoj donas partoprenrajton al la lotumado. La vortoj kun (R) estas radikvortoj. La solvoj estu ensendataj antaŭ la 5a de Decembro rekte al Sro F. Volders, *Bredastraat 94, Antwerpen.*



HORIZONTALE. — 1) Arbo. (R) — teatro.

2) Spirita, viviga principo de la homo. (R) — kiu apartenas al certa doktrino. (R) — havi efektivan rezultaton. (R)

3) Ludilo. (R) — ĉarme kaj elegante maldika. (R) — planto (kompozitoj) (R).

4) Ofende fiera. — malgranda dorna besteto. (R).

5) Speco de bovo. (R) — preciza. (R) — hundspeco.

6) Du sinsekvaj literoj el stato. — sekrecio de kelkaj membranoj de organismo. — arbo. (R) — sufikso.

7) Povas esti. — floro. — vivbezonaĵo (adv.)

8) Reĝo de la bestoj. — kolekto de precizaj tempoj de certaj okazintaĵoj, (R) — mezurunuo de intenco de elektra fluo. (R)

9) R. N. — malprobis. — eltiri lakton. (R) kanto. (R).

10) Templo. (R) — dolĉa, malsovaĝa. (R) — ekstraktaĵo el kano aŭ beto. (R).

11) Arbo. (R) — linieto limiganta geometrian figuron. (R) — neefektive.

12) Pron. pers. — forlasi ian lokon. (R) — ŝovu la langon sur io. — trinkaĵo. (R).

13) Bastono, malnova armilo. (R) — respekte al dio. — pafilparto. (R)

14) Vojo en ĝardeno. (R) — orda numeralo. — plantspeco. (R) — orda numeralo.


15) Floro. — rapide rajdi (adv.) — elektra fajrero. (R).

- 16) Markrustulo. (R) — saĝulo. — gajniga koloro en kartludo. (R).
- 17) Drogo. (R) — arbo.
- VERTIKALE. — 1) Vigla itala danco. (R) — vestaĵo. (R).
- 2) membraro. (R) — diferenco inter la ŝajna kaj vera situo de astro. (R) loko kie finiĝas ia definitiva spaco. (adj.)
- 3) Dangera haŭtmalsano, (R) — vaste. — multaj subteraj lokoj, (R).
- 4) adorinklinon, (adj., akuz.) — Kapparto. (R) — voko (turnigita). (R).
- 5) Totemo. (R) — akvoŝvelo. (R) — mallarĝa lignopeco. —
- 6) Sufikso. — korpparto. — kunigitaj folioj. (R) — malgranda. (R).
- 7) Birdloĝejo. (R) — laukŭtime. (R) — malofta metalo. (R).
- 8) Meblo. (R) — plata skatolo. (R) — artfarita hararo. (R).
- 9) Dependiga konj. — peni ne renkonti iun. (R) — formovigi boaton. — kanto. (R).
- 10) Bakitaj ovoĵ. (R) — atutaj pecoj de certa ludo. (R) — ne plu estas.
- 11) Velki. (R) — interna kapparto. (R) — postuli.
- 12) Prepozicio. — imago, koncepto. — paperujo. — numeralo.
- 13) Elektrodo. (R) — pivoto. (R) — publika promenadaleo. (R).
- 14) Pezilo. (R) — interna busparto. (R) — geografia karto (turnigita) (R).
- 15) Okupo, profesio. — jararo. (adj.) — ŝipo.
- 16) orda numeralo. — celante la liberigon de la tuta nacia teritorio. (R) — korpparto. (R).
- 17) Okbretara. (R) — ripeta voĉdono por ia kandidato.
- Mallongigoj:* (adv.) = adverbe. (adj.) = adjektive.

PROBLEMO 39.

MURFASAD-ENIGMO. (15 poentoj).

- | | |
|--|----|
| | 1 |
| 1) Vokalo. | 2 |
| 2) Trinkaĵo. (R) | 3 |
| 3) Plektaĵo. (R) | 4 |
| 4) Facilmova, gracia. | 5 |
| 5) Linio limiganta geometrian figuron. (R) | 6 |
| 6) Ekkoni, amikigi (Adv.) | 7 |
| 7) Flagra. | 8 |
| 8) Tableto servante al arta ludo. | 9 |
| 9) Stopileto. | 10 |
| 10) Grupo da elektraĵoj. | 11 |
| 11) Kapkovrilo. (R) | 12 |
| 12) Orda numeralo. | 13 |
| 13) Pfanedo. (R) | 14 |
| 14) Muziknoto. | 15 |
| 15) Konsonanto. | |



Formu vortojn de la ĉi-supraj difinoj, uzante ĉiam la samajn literojn. De 1 ĝis 8 aldonu unu literon ĉia linio, poste forfalu unu.

FLANDRA LIGO ESPERANTISTA

(Vlaamsche Esperantisten - Bond)

Voorzitter: H. Rainson, Hombeekse steenweg, 54, Mechelen.
Ondervoorzitter: E. Cortvriendt, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
Sekretaris: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat, 29, Kortrijk.
Penningmeester: Adolf De Keyzer, P. Van Humbeekstraat, 3, Brussel-West.
Orgaan: «Flandra Esperantisto», maandblad.
Postchek: Flandra Ligo Esperantista, Brussel, Nr. 2321.50.

AFDEELINGEN:

Aaist: «Pioniro». Sekretariaat: Molenstraat, 30.
Aarschot: «La Progreso». Sekretariaat: Fabriekstraat, 28.
Antwerpen: «Flandrema Grupo Esperantista». Sekr.: Stefaniestraat, 44.
Anzegem: «La Juna Espero». Sekretariaat: Statiestraat, 38.
Arendonk: «La Verda Kampina Stelo». Sekretariaat: Schotelven, 4.
Blankenberge: «Norda Stelo». Sekretariaat: Koninginnelaan, 18.
Brugge: «Paco kaj Justeco». Sekretariaat: Komvest, 70.
Brussel: «Nia estas la Estonteco» (N. E. L. E.) Sekr.: P. Van Humbeekst, 3.
Deinze: «Deinza Esperanto-Klubo» (D. E. K.) Sekretariaat: Dorp, 54 Astene.
Diksmuide: «Grupo Zamenhof». Sekretariaat: Maria Doolaeghstraat, 36.
Gent: «Roeland». Sekretariaat: Raapstraat, 82.
Kortemark: «Eta semo povas kreski». Sekretariaat: Statiestraat, 23.
Kortrijk: «Esperantista Grupo». Sekretariaat: Moeskroenstraat, 11.
Lebbeke: «Vasta Horizonto». Sekretariaat: Stationstraat, 87.
Leuven: «La Nova Tagiĝo». Sekretariaat: Broekstraat, 21, Heverlee.
Lichtervelde: «La Tagiĝo». Sekretariaat: Weststraat, 47.
Mechelen: «La Estonto». Sekretariaat: Vekestraat, 25.
Oostende: «Ostenda Grupo Esp-tista». Sekretariaat: Torhoutsche stw. 150.
Oudenaarde: «Al Paco». Sekretariaat: Nederstraat, 8.
Roeselare: «Ruselara Esperantista Grupo». Sekr.: Hoogledestwg. 163-165.
Staden: «Nia Grupeto». Sekretariaat: (M. Vandamme). Vijfwegen.
Tienen: «Zamenhofa Standardo». Sekretariaat: Bruulstraat, Kumplich.
Torhout: «La Verda Stelo». Sekretariaat: Boomgaardstraat, 4.
Vichte: «La Frateco». Sekretariaat: Harelbekestraat, 29-a.
Vilvoorde: «La Verda Stelo». Sekretariaat: Marius Duchéstraat, 45.
Wervik: «Fratiĝo». Sekretariaat: Brugstraat, 9.
Wetteren: «Persisto». Sekretariaat: Eesvelde, 119, Kalken.
Wevelgem: «Per Esperanto al Mondpaco». Sekretariaat: Papenstraat, 54.
Wocumen: «Veni, Vidi, Venki» (V. V. V.) Sekretariaat: (Rom. Vandepoele).
Zwevegem: «Paco per Esperanto». Sekretariaat: Ootegemstraat, 71.

VERTEGENWOORDIGERS:

Assche (Brabant): L. De Rop, Tenberg, 24.
Deerlijk: Fr. Benoit, Kapellestraat, 7.
Hamme (O. Vl.): G. Lenaers, Willemstraat, 22.
Harelbeke: A. Doornaert, Stasegemstraat, 97.
Mol: L. Claeys, Kapellestraat, 3.
Mortsel: H. Van Durme, Eggestraat, 21.
Ronse: G. De Boes, Wijnstraat, 81.
Sint-Truiden: G. Mathijs, Steenweg op Hasselt, 55.
Tielt: R. Plettinck, Steenweg naar Marialoop.

Flandraj Esperantistoj, via organizo estas:
Flandra Ligo Esperantista !

OSTENDO

HOTELO METROPOLE

Kerkstraat, 32

75 komfortaj ĉambroj kun fluanta akvo, varma kaj malvarma. Centra hejtado. Lifto. Aŭtomobilejo. Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

MODERAJ PREZOJ

S-ano Snykers havas la plej bonajn rekomendojn kaj persone direktadas.

DRUKKERIJ

Aŭtomata Presejo

H. BRAEKEVELT

Statiedreef, 177, Roeselare.

Posedas vastan klientaron en la flandraj provincoj.

Presejo konata pro sia belgusta kaj moderna preso.

Liveras al la diversaj esp. grupoj kaj ligoj. Sendevige petu prezoferton kaj modelojn.

Tel.: 1080.



Proksime de la naĝejo (200 m.).

Presejo "HOOGER OP" Lavrijsen, Arendonk. Tel. 52.

"BREUGEL"

SPIJS- en DRANKHUIS

Em. Jacquainlaan, 37, Brussel

Lekkere Dranken

Fame konata pro siaj bongustaj kaj malmultekostaj manĝoj.

Ejo de N. E. L. E.

(Brusela grupo Esperantista)

VARBU

ANONCOJN!

Café Nieuwe Carnot

FRANS NEEFS-D'HELDT

Carnotstraat, 70 — Antwerpen

Plej bonaj trinkaĵoj.

Salonoj por societoj — Malvarmaj

manĝaĵoj — Bonega servado.

Ejo de Flandrema Grupo.

St. MARIABURG

10 KM. DE ANTVERPENO

Grand Hotel de la Chapelle

lokita en arbarĉirkaŭaĵo

ĉia moderna komforto — aŭtomobilejo laŭteniso — infanludejo — teraso

Restoracio — Familia pensiono

N. B. - Elektita loko por ekskursaj celoj Kuirejo kaj kelo bonreputaciaj.

Wwe VAN HAVER-DE BOES